Okaze de la Internacia Tago por Toleremo, 16 Novembro 2017

“Je la tago de ĝia kvindeka datreveno, la 16-an de novembro 1995, la membraj ŝtatoj de Unesko akceptis Deklaron de Principoj pri Toleremo. Interalie, la Deklaracio asertas, ke toleremo estas nek indulgo nek indiferento. Ĝi estas respekto kaj apreco de la riĉa diverseco de la kulturoj de nia mondo, niaj formoj de esprimo, kaj niaj manieroj homi. Toleremo rekonas la universalajn homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn de aliaj personoj. Homoj nature diversas; nur tolero povas garantii la pluvivon de miksitaj komunumoj en ĉiu regiono de la terglobo.

“La Deklaracio priskribas toleremon ne nur kiel moralan devon, sed ankaŭ kiel politikan kaj juran devigon por unuopuloj, grupoj kaj Ŝtatoj. Ĝi situigas toleremon en rilaton al la internaciaj homrajtaj instrumentoj formulitaj tra la pasintaj kvindek jaroj, kaj emfazas, ke Ŝtatoj elformulu novajn leĝojn kie tio necesas, por sekurigi egalecon de pritrakto kaj vivoŝanco por ĉiuj grupoj kaj unuopuloj en la socio.

“Rektaj maljusteco kaj perforto estas oftaj formoj de maltoleremo, sed same ankaŭ diskriminacio kaj flankenŝovado. Edukado por toleremo celu rebati influojn kiuj kondukas al la timo de aliuloj kaj ilia ekskludo, kaj helpu la gejunulojn formi kapablojn de sendependa juĝkapablo, kritika pensado kaj etika rezonado. La diverseco de la multaj religioj, lingvoj, kulturoj kaj etnoj ne estas preteksto por konflikto, sed trezoro kiu riĉigas nin ĉiujn.”

Tion deklaras la retejo de Unuiĝintaj Nacioj koncerne toleremon kaj la Internacia Tago por Toleremo, kiun oni festas la 16-an de novembro. Kiel vi praktikas toleremon en via agado por Esperanto? Kiel vi esprimas ĝin en via ĉiutaga vivo?

Ni invitas vin, okaze de la Internacia Tago por Toleremo, dediĉi vin al persona kaj kolektiva toleremo en la spirito de nia lingvo Esperanto!

Esperanto por UN
Novjorko, novembro 2017

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041